

# LA SUNO HISPANA

Direktoro-Administranto ★ Director-Administrador

**RAFAEL DUYOS**

CIRILO AMORÓS, 28 = VALENCIA

La Redakcio korektos la manuskriptojn laŭbezone, kaj la nepresitajn ĝi ne resendos.

**ENHAVO:** Kondolenco.—IV Internacia Esperantista Kongreso (cirkulero).—Niaj konkursetoj.—Profiloj de ekzamenistoj.—Sección gramatical.—Invitación.—La ombro (daŭrigo).—Noticias del extranjero.—Sciigoj el Hispanujo.—Bibliografio.—Niaj fraataj vizitantoj.—Anoncoj.

D.<sup>ro</sup> L. L. Zamenhof perdis sian amatan patron, la eminentan filologon M. F. Zamenhof, aŭtoron de la «Esperanta Proverbaro».

Al li kaj al lia respektinda familio sendas plej koran kondolencon

LA REDAKCIO.

## IV INTERNACIA ESPERANTISTA KONGRESO

Dresden, 16-22 Aŭgusto 1908

*Unua cirkulero de la Kvaro por la kvara.*

Apenaŭ la lasta brilo de la glora tria kongreso estingiĝis, kaj jam la unuaj radioj de la kvara estas videblaj. La gesamideanoj jam scias, ke en Kembriĝ' Germanujo invitis la Esperantistaron, la urbo restis ankoraŭ nedifinita. Nun Germanujo, en harmonio kun la Centra Organiza Komitato kaj kun la konsento de D.<sup>ro</sup> Zamenhof elektis Dresden' kiel la plej taŭgan urbon.

La bela saksa ĉefurbo havas tre oportunan situacion Ĝi nek estas nordgermana nek suda urbo, ĝuste en bona mezo de Germanujo ĝi kuŝas facile atingebla por ĉiuj landoj. La Kvaro, kiu aranĝos la kongreson, estas: D.<sup>ro</sup> Mybs, D.<sup>ro</sup> Schram, S.<sup>ino</sup> Hankel kaj S.<sup>ro</sup> Arnhold. Tiu-ĉi kvaro ĉion faros, por faciligi al la kongresontoj la vojaĝon kaj la loĝadon. La Societo por la Interkomunikiĝo de la Fremduloj (Fremdenverkehrsverein) tre afable proponis al la kvaro sian helpon; per kunagado kun tiu-ĉi Societo la kvaro aranĝos malkaran restadon al niaj gastoj. Kun kora gastemeco ni ilin atendas, entuziasme ni ilin akceptos! La malnovaj amikoj revidos unu la aliajn,

novaj ligoj fariĝos, pli intime la granda familio unuiĝos. En la lando de la scienco tre granda ekspozicio montros la riĉan literaturon de nia lingvo.

Post la kongreso ekskursoj tra Germanujo estos aranĝotaj, ni esperaj, ke multaj Esperantistoj partoprenos. Tiuj el ili, kiuj preferas la viziton kaj restadon en trankvila «Esperanta Vilaĝo» trovos en Weisser Hirsch la deziratan ĉarman lokon, veran Esperantistujon. Jam nun oni tie aranĝis kursojn.

La sukceso de niaj entreprenoj dependas de la multnombra apero de la gesamideoj. Ĉiuj nacioj estu bone reprezentotaj! Ni petas, ke oni baldaŭ anoncu sian nomon kaj profesion klare skribitan, kun detala adreso al la *Oficejo* de la kvara, kiu restos ĝis la definitiva translukiĝo al Dresden (en komenco de somero 1908) ĉe la Prezidanto D.<sup>ro</sup> Mybs, Altona, a. E., Marktstr. 68. Ankaŭ ne forgesu la donacan kason kaj la Garantian fondajon, ĉar ni bezonas multe da mono. Ni do petas, ke oni sendu ĉiujn monojn al la bankejo Fratoj Arnhold (Gebr. Arnhold) Dresden, Waisenhausstrasse 20.

La Kvaro por la kvara. *D.<sup>ro</sup> Mybs, D.<sup>ro</sup> Schramm, Marie Hankel, H. Arnhold*

\* \* \*

Ni ricevis kelkajn ekzemplerojn de la oficiala ilustrita invitpoŝtkarto por la kvara Kongreso; ni rekomendas ĝian uzon al niaj amikoj por helpi al la entrepreno de la *Kvaro*. Oni sin turnu por mendoj al S.<sup>ro</sup> Referendaro Arnhold, *Dresden-Altstadt*, (Germanujo), Waisenhausstrasse 20; la prezoj estas: 1 ekzemplero, 10 pfenigoj; 50 ekzempleroj, 3 markoj; 100 ekzempleroj, 5 markoj.

## Niaj konkursetoj

Ni aranĝos de nun ĉiutrimonatajn konkursetojn por niaj abonantoj. Ne timu! ni ne malfaciligos ilin por ke ne okazu ia freneziĝo. Ĉiu konkurseto konsistos el tri problemoj kaj al la tri plej lertaj divenintoj ni disdonos malgrandajn premiojn. Ĉar ni jam sufiĉe scias ke ĉiuj niaj abonantoj estas lertegaj, la sorto montros la premiojn.

### 1.<sup>a</sup> (PLENA FRAZO.)

LI DA

### 2.<sup>a</sup> (ENIGMO.)

Mi estas malgranda afero; antaŭmetu al mi konsonanton kaj mi fariĝos tre granda; antaŭmetu ankoraŭ al mi alian literon kaj mi fariĝos grandega, senlima; fine, antaŭmetu denove al mi literon kaj vi ricevos aferon nek grandan, nek malgrandan, sed kiu multe nin priokupas.

### 3.<sup>a</sup> (DEMANDO.)

Per kiu similas kato al cindro?

La premioj disdonotaj estas: 1.<sup>a</sup>, kravatpingleto esperantista; 2.<sup>a</sup>, ekzemplero de «Edziĝo malaranĝita aŭ terura nekomprenejo», de Vicente Inglada; 3.<sup>a</sup>, dek ĉefeĉaj ŝlosiloj hispanaj.

La solvoj kaj nomoj de la premioj ni konigos en la Aprila numero, kiu ankaŭ enhavos la duan konkurseton.

## Profiloj de ekzamenistoj

Tradukita laŭ artikolo de *Journal des Sciences Médicales de Louvain* (jaro 1880\*).

La priskribaĵoj, kiujn mi havas la honoron prezenti al vi, ne estas kuracistaj skribaĵoj pri malsanuloj. Tiujn ĉi ili ne similas praktike, pli ol albumo da fotografajaĵoj similas didaktikan verkon ajn, pli ol plenmano da kampaj floretoj similas fojnan garbaron. Mi do admonas la legantojn, kiuj ne havas tempon perdindan, la *aquila qui non capiunt muscas* ne halti antaŭ tiuj skizetoj desegnitaj ne por ili sed por aliaj, per kraĵono nelerta sed plene sincera.

Ekzamenisto mi ne estas. Ekzamenebla mi ne estas plu... Ho ve! Mia senpartieco estas do tre serioze garantiata. Plie mi aldiras, ke mi iam ne havis gravajn kaŭzojn por plendi pri miaj ekzamenintoj, kaj sekve, ke mi povas paroli pri ili sen malameto. Ĉiufoje, kiam inter ili kaj mi okazis ia negrava malkonsento, ili estis malpravaj... nature!... Sed estas pasintaj la tri tagoj, dum kiuj mi estus povinta malbeni miajn juĝintoj; kaj cetere mia memoro pri la ofendoj neniam daŭras eĉ dum tiu leĝa tempo.

De ĉiuj elstuduloj estas sciate, kiel grava kaj malfacile starigebla estas bona klasigo. En lo zoologio—(mi ne faras ian senrespektan komparon)—la bestoj estis unue ordigitaj laŭ karakterizaĵoj tute eksteraj kaj neprecipaj: haro, plumo aŭ skvamo; kaj kredeble en tiuj pratempoj okazis, ke Nia Patrino la Sankta-Eklezio klasigis la omaeon, la ostron, la akvokokinon kaj eĉ la fokon (mambeston, kiu elparolas: «paĉjo!») inter la nutraĵoj permesitaj dum la «malgrasaj tagoj». Ĉe la nua tempo, dank'al la superegeco de la Scienco oni serĉas pli gravajn karakterizaĵojn por diferencigi la klasojn, la gentojn, la specojn; kaj tial por klasigi science la ekzamenistoj, kvazaŭ Zoologiistoj mi devus reiri ĝis la ovo: *omne vivum ex ovo*; oni naskiĝus ekzamenisto, kiel oni naskiĝas poeto aŭ kuiristo, kiel oni naskiĝas tigro, karmo aŭ kolombo. Tiom da analiza profundo kredeble ne estas necesa, al kiu intencas ne skribi dikan libron *ex professo*, sed nur pasigi sub la okulojn de la leganto kelke da modestaj profiloj aŭ skizetoj.

Sufiĉas do plene al ni tre simpla apartigo tuj komprenebla por ĉiuj:

Estas ekzamenistoj **bonvolaj**.

Estas ekzamenistoj **malbonvolaj**.

Poste, ni vidos, ĉu inter tiujn ambaŭ klasoj oni povas akcepti trian.

Kvankam tiu apartigo de la bonaj kaj de la malbonaj ekzamenistoj iom similas la Lastan Juĝon, ĝi tamen havas nenion absolutan. Ia malbona okazantaĵo: malfacila digesto, malsato, neoportuna seĝo, podagra ataketo, nazkataro... k. t. p., povas malbonigi la plej bonan juĝiston; aliparte ia dolĉiga influo: la espero pri bona tagmanĝo—(mi citas nur tiun ekzemplon)—povas humanigi ekzameniston nature kruelegan. Sed se estus necese atenti tiujn negravaĵojn kaj tiujn esceptojn, nenia klasigo estus ebla.

Farinte tiujn rimarkojn, vidiginte nian celon, certiginte pri niaj bonaj intencoj, ni jetas nin, laŭ la konsilo de Horacio (Arto Poeta), *in medias res* kaj ni komencas niajn profilojn por la plej malbonaj.

### I. LA MALBONVOLAJ.

Tiun ĉi klason de la *Monstrum horrendum* ni dividos en multaj specoj... el kiu, la plej bona nenion valoras: maldelikatuloj, ŝajnaj dolĉuloj, ruzuloj, vengemuloj ĉikanemuloj... k. c... kc... Ĉiuj malbonaj!

—Tiu ĉi moke elparolas siajn demandojn; li estas certa, ke oni diros nur «azenaĵoj», kaj bona respondo lin enuas pli ol la malbona, kiun li esperis.

—Tiu volas, ke oni respondu nun per «Jes» aŭ per «ne». Se vi diras «Jes», li vin rebatas fortege; se vi diras «Ne», li ankoraŭ vin rebatas, kaj pruvas al vi, ke nur per «Jes» estis respondeble. Por neniiĝi vian opinionon, kaj ajn ĝi estas, li atendis, ke vi estos ĝin elparolinta, kaj li tiel fortege batas vin, nur ĉar vi estas sub li por ricevi ĉiujn batojn.

—Tiu ĉi alia dolĉavoĉe starigas demandeton insidan kaj plenan je danĝeroj: vi antaŭeniras ne malfidante, sed baldaŭ vi ekvidas, ke vi ne estas sur la bona vojo. Unu vorto sufiĉus por vin savi, sed tiu vorto ne venas. La *Ariane'a* fadeno ne estas prezentata al vi, oni vin lasas enŝlimiĝi pli kaj pli... «Kiel! pri tiel facila demando? Ha! oni ja vin kredis pli kleral!»

—Tiu alia priparolas al vi la precipaĵojn de ia demando, kiun vi pritraktus tiel bone kiel li, kaj fine demandas vin pri sensignifa malgravaĵo, precize tiu sola, kiun vi ne konas! «Ha! vi do scias ne... ni... on!»

—La Ruzulo vin ekcitas per sia rideto, vin tedegas per siaj pinglaj piketoj; vi iam permesis al vi ekridi dum lia kurso, «nu, dancu nun!» kaj, laŭ lerneja elparolo, li suferigas vin per lerta kaj senfina *tirage en bouteilles* (enboteligo?)

—S.<sup>ro</sup> Akademos verkis dikajn libron—kiu enerigis lin en multajn sciencajn societojn—por elmontri, ke oni devas rompi la duonkuiritajn ovojn ĉe la pinto. Ĉar vi ne konas tiun gravegan verkaĵon, vi konservis la kutimon ilin tranĉi ĉe la larĝa ekstremajo. La kolerego de via juĝisto vidigas al vi, ke tiu maniero estas grandega malspritaĵo farebla nur de bestegita nesciulo. Kaj jen ekkomenciĝas por vi la turmentego de la pistomartelo: unu post la alia, senkompate, per sia tuta pezo la argumentoj de la dika libro, kiun vi ne legis, ekfalas sur vian kapon.

—S.<sup>ro</sup> Hirsutus demandante vin, vidigas sin plej tetro kaj malafabla. Trovu do ion direblan por plaĉi al tiu grizmiena malbonhumorulo. Li oscedas dum viaj plej bonaj respondoj, aŭ ilin li aŭskultas movigante siajn ŝultrojn kaj dirante: «Mi ne kontraŭdiras!» aŭ «Mi ne neas!» aŭ «estas eble!» Post kelkaj minutoj la plej bone preparita kandidato tute senfortiĝas.

—S.<sup>ro</sup> Raminagrobis ŝajnas kviete dormeti; vi ne scias ĉu li vin aŭskultas; eĉ estas kredeble, ke li ne aŭdas. Sed se vi ellasas la plej malgrandan rekorektaĵon, li subite eldormiĝas, kaj ekkaptas la erareton, kiu en lia buŝo rapidege pligraviĝas. La netaŭgeco de iu vorto fariĝas sensencaĵo! herezo!! monstregajo!!! Kaj jen vi per unu unĝobato estas tute faligita.

—S.<sup>ro</sup> Pandaimon en si enhavas ĉiujn modelojn ĵus montritajn. Vera Proteo, tiu lertega inkvizitoro aliformigas sin ĉiumaniere, kaj la lasta rondo de la Dante'a infero ne estas sufiĉe vasta por ricevi ĉiujn liajn perfidaĵojn.

Tremantaj kandidatoj! Dio antaŭgardu vin kontraŭ ĉiuj tiuj turmentistoj ĵus priskribitaj, kaj kontraŭ kelkaj aliaj tuj prezentotaj!

## II

Jen estas serio da individuoj tiel malfacile enklasigeblaj kiel la vesperto de la *koneta* fablo: «Mi estas birdo... vidu miajn flugilojn! Mi estas muso... pereu-la katoj!» Antaŭrigardante nur la rezulton de la ekzameno, la solan vidpunkton kiu lin interresas, la studento enmetos ilin sensancele inter la malbonulojn. La filozofo, kiu juĝas pli alte, kaj estas malevera ĉiufoje, kiam li havas nenion por perdi, ilin lokos inter la bonulojn, tial ke ili eble estas bonaj kiel la urso de la *ĝardenamanto*, kaj tial ke, se ili estas malbonaj, ili estas tiaj nekonscie kaj nepripensinte. Ĉar ni ŝatas nian klasigon nur tiom, kiom ĝi helpas al ni, ni lasas la leganton libera enloki tiujn amfibiek-

zamenistoj en unu el la ambaŭ grandaj klasoj, kiujn post profunda silentado ni proponis al li.

—**La detaletamantoj.** Vi ĵus elpritraktis en maniero tute sufiĉa—por vi—gravan demandon. **Via** respondo estis metoda kaj plena... Sed vi nenion diris pri ia opinio de **negrava verkisto**... Sed denombrante argumentojn, el kiuj unu sufiĉus por pruvi vian tezon, vi forgesis la sesan aŭ la sepan... Sed en ovaĵon vi metis neparan nombron da saleroj! Malfeliĉulo! Vi devis ilin meti pare! Kaj jen pro negravajeto multaj ovoj difektitaj!

—Tridek lernantoj estas enskribitaj por unu kunsidaro; ekzamenisto **Alea** enjetas iliajn tridek nomojn en ĉapelon, tridek demandojn en alian, poste li skuas, kaj... *alea jacta est!* Vi ricevos la demandon, kiu eliros el unu ĉapelo ĉe la momento, kiam via nomo eliros el l'alia. Tio estas nepre justa... Sed *summum jus, summa injuria*: la sciigantoj ricevas facilajn demandojn, per kiuj ili ne povas brili, la sciantojj malfacilajn demandojn, el kiuj ili ne povas sin eltiri. Se vi neniam estis ŝanculo, se jam dum via infanaĝo viaj buterpanoj falis kun la konfitaĵo malsupre, via nomo eliros el la ĉapelo ĉe la malbona momento. Vi aŭdigas, ke vi pliamus alian demandon... Vane! Kun la demando donita de la sorto vi devas venki... aŭ morti.

—**Alia**, al kiu vi estas bone respondanta, vin subite haltigas: «Mi vidas, ke vi perfekte konas la demandon, kaj... mi tuj starigos al vi alian». Turmentegisto!

—**S.<sup>ro</sup> Fermbuŝo** elĵetas al vi sian demandon, poste li renversigaĵas sur sia seĝo, krucigas siajn brakojn, aŭskultas kaj silentas nevenkeble. Vi devas mem vin savi: vi estas en akvo... naĝu!

—Se l'obstina muteco de **S.<sup>ro</sup> Fermbuŝo** vin konfuzigas, la maniero de **S.<sup>ro</sup> Kiokial** vin surdigas. Li interrompas ĉiumomente, faligas sur vin malpezan pluveton da demandaj punktoj, saltetas el demando sur demandon, reiras malantaŭen, ĵetas al vi jen «sed», jen «se», kaj ĉirkaŭas vin tiel bone per parentezoj kaj kurbajetoj, ke baldaŭ vi perdas la fedonon, kaj vi tute nescias, kie vi estas.

—**S.<sup>ro</sup> Pavido** ne demandas vin por vidi, kion vi scias;—tio ne interesas lin—sed por montri al vi, al la ĉeestantoj, al siaj kolegoj, kion li mem scias. Li preparis la temon, li ĝin malvolvas, ĝin komentarias, pulvorigas imagitajn kontraŭdirantojn, li pave starigas siajn plumojn, per unu vorto: li afektas. Via rolo estas facila. Estas sufiĉe, se vi taŭge jesas aŭ neas. Kaj, ĉar la paroladanto estas ĉiam tre kontenta pri si, okazas kelkafoje, ke li estas kontenta aŭkaŭ pri vi.

**S.<sup>ro</sup> Pavido** eble ne estas bona en si, absolute; sed, rilate, kia bona juĝisto! Kaj kian bonan transiron li donas al mi por alveni al la ekzamenistoj bonaj *in se*, absolute, la vera mielo, la vera sukero, la juĝista kremo, al la vera patroj de la studentoj.

### III

Bone demandi, diris iu—kiu? mi jam ne memoras—estas pli malfacile ol bone instrui. Kaj la sperto elmontras, ke altgradaj scienculoj estas iafaje malbonaj demandantoj. Kian aron da kvalitoj li devas kolekti por realigi la idealan juĝiston, laŭ niaj revoj! Kia sagaceco estas necesa por antaŭsentati la fortajn punktojn de la kandidato, kia saĝeco por eviti la malfortajn lokojn, kia arto por enŝovi, nevidate de la ĉeestantaro, la respondon en la demandon, kia lerteco por subteni la ŝanceligaĵanton, restarigi la falanton, elakvigi la dronanton! Mi konis kelke da tiaj artistoj kapablaj igi min respondi kontentige pri finaj antikvaĵoj, aŭ pri lingvoj kun kojnoformaj literoj, kaj min konvinki, ke por tiaj lernadoj mi havas rimarkindan kapablon.

—Ĉe la komenco de la kunsidaro, **S.<sup>ro</sup> Optimo** estas malfeliĉa kiel la ŝtonoj—se la ŝtonoj estas malfeliĉaj; pri tio mi dubas—. En juĝejo li estus unu el tiuj juĝistoj, kiujn neniam rifuzas la advokato de la kulpulo. Ĉar ili senkulpigas ĉiam, kaj akcep-

tas la malplej verŝajnajn moderigajn cirkonstancojn. Li tremas elparolante sian demandon, atendas malkvietege la respondon, ĝojiga se ĝi estas akceptinda, kaj ekvidigas la plej profundan malesperon, se ĝi estas malbona. La kandidato, kiu havas «iom da okulo» legas tiujn korsentojn sur la vizaĝo de la bonulo, kaj facile trovas en la sulkoj de liaj brovoj aŭ de lia buŝo la «jes» aŭ la «ne» per kiuj estas respondeble. Vi ne konas la daton de la fondo de Romo?... bone! Li demandas vin pri la dato de la revolucio de la 1789<sup>a</sup> jaro. Cion enhavatan de ia kandidato eltiras S.<sup>ro</sup> Optimo, kaj en li, trovas eĉ plie!

—S.<sup>ro</sup> Ciferplato en siaj demandadoj antaŭeniras laŭ regula kaj neforlasebla ordo. La reveno de kometo aŭ de lunmallumiĝo estas malpli certa ol la reveno de liaj demandoj. La sola kaprico, kiun li kelkafoje permesas al si, estas komenci per la lasta demando. Se la unua respondonto konas la unuan kaj la lastan demandon de lia demandaro, li estas certa pri sia sukceso; poste la dua respondonto devas nur relegi rapide la duan kaj la antaŭlastan demandojn; kaj, ĉar du punktoj sufiĉas por determini rektan linion, la ordo de la demandaro estas konata. Diru al mi vian horon, kaj mi diros al vi vian demandon; tiun tagon, ĉe tiu horo, S.<sup>ro</sup> Ciferplato estos tie. Kun la rondirantaj demandantoj nenia surprizo, nenia neatenditaĵo, nenia malfeliĉo estas eblaj!

Mi haltas por ne tro grandigi tiun profilaron. Al tiu, kiu riproĉus min pro la multnombro de miaj bonvolaj ekzamenistoj, mi povus respondi per tiuj vortoj de la sceno de la portretoj en *Hernani*: «Mi preterpasis kelke da ili kaj eĉ el la plej bonaj!» Sed mi eble mensogas tiom, kiom la aktoro de tiu teatraĵo.

*Tradukis D.<sup>ro</sup> A. MELIN.*

Belgujo.

## SECCIÓN GRAMATICAL

**J. R.**—La *ñ* tiene el mismo sonido que la *n*. No hay más diferencia, que la primera se considera consonante y la segunda es vocal. ¿Que esta dualidad de signos para un mismo sonido puede ser una dificultad ortográfica? No hay tal; la *ñ* se pronuncia siempre unida á otra vocal, formando los diptongos *añ*, *eñ*; la *n* no puede unirse á otra vocal y formará sílaba. No olvide usted la regla de que en Esperanto cada vocal determina una sílaba y que el acento carga sobre la penúltima; esta regla sirve de guía al que escucha ó escribe al dictado para saber en qué casos el sonido esperanto debe escribirse *ñ* ó *n*. Si á mí me dictan *balan* (ba-lá-u), como cargan el acento en *lá*, yo sé que la *n* que sigue es vocal, pues de lo contrario, *lá* no sería la penúltima sílaba. Al oír *adían* (a-dí-añ) *di* es la penúltima sílaba por ser la acentuada, y como luego sigue la *a*, que es vocal indudable, la *ñ* que la acompaña es consonante. Esta misma aclaración le servirá para comprender por qué tenemos otros dos signos, *i*, *j*, para un mismo sonido. La *i* siempre es vocal, la *j* se une á otra vocal para su pronunciación y no forma por sí sola sílaba, por ejemplo, *kanajlo* (ka-náj-lo) y *balailo* (ba-la-i-lo).

*Sinjoro, kaj, infanojn*, debe usted pronunciarlos, *sin-yó-ro, kaj, in-fá-wojn*.

Las letras tienen siempre el sonido que se les asigna en el alfabeto, regla invariable que exige el fonetismo del idioma. Por lo tanto, *kvar*, *kvin*, se pronuncian dando á cada letra el sonido correspondiente. Si le es á usted difícil, y como ejerci-

cio preventivo, repita usted muchas veces las voces *ekvar*, *ekvin*, y suprima luego el sonido de la *e* inicial.

Dé a la *r* un sonido medio, ni fuerte ni suave; pero si por estar en principio de dicción, ó por la vecindad de algunas consonantes tuviese usted necesidad de pronunciarla un poco fuerte, no hay inconveniente grave en ello, pues no existiendo en Esperanto nuestra *rr*, no puede haber confusión.

El Dr. Zamenhof en los primeros folletos publicados usó el pseudónimo Dr. Esperanto, de donde viene el nombre del idioma. *Esperanto* es el participio presente del verbo *esperi* con terminación de sustantivo, y significa *el que espera, el que tiene esperanza*.

**A. G.**—No debe ser; en general no es de recomendar la sustitución del dativo por el acusativo; diga usted, pues, *mi skribis al vi hieraŭ*.

**M. N.**—Esas raíces son de las recomendadas por el Dr. Zamenhof y figuran en los diccionarios alemanes por él redactados. Al aceptarse la raíz *aspekt*, la palabra *elrigardi* ha tomado el sentido verdadero que le dan sus componentes. Ejemplo: *li elrigardis de la fenestro*—él miraba (hacia afuera) desde la ventana.

**R. P.**—Para nosotros no admite discusión el *Fundamento*, y como esas voces figuran en la *Universala Vortaro*, no podemos introducir las variaciones que usted propone.—El diccionario de Esperanto en Esperanto está en preparación, pero ignoramos el nombre del autor; ya anunciaremos su aparición en estas columnas.

HISPANO.

## INVITACIÓN

La Sociedad Internacional de Juristas Esperantistas (I. S. E. J.), fundada en el Congreso de Ginebra con objeto de estrechar las relaciones profesionales entre los que cultivan el estudio de las leyes en los distintos países, celebró su primera Asamblea general en el tercer Congreso celebrado en Cambridge.

En esta Asamblea se tomaron importantísimos acuerdos, y entre ellos el de pagar la idea de unión de juriconsultos, jurisperitos, notarios, procuradores, etc., de todas las naciones, á fin de que estrechando sus relaciones profesionales por medio del Esperanto, sea esta unión útil á ellos mismos y á sus clientes.

Delegado (como vicepresidente por España) por la Asamblea, para llevar á efecto en nuestra patria tales acuerdos, invito á todos los profesionales que crean conveniente y provechosa la formación de un núcleo de juristas españoles, que á su vez forme parte del núcleo mundial de *samprofesianoj*, á la formación de la Sociedad Española de Juristas esperantistas (H. S. E. J.).

Cumpliendo de este modo mi cometido, á los compañeros que quieran inscribirse ó á los que deseen alguna noticia más ó aclaración, tendrá mucho gusto en complacerles su compañero

ANDRÉS PIÑÓ, *abogado*,  
*Museo, 5, Valencia.*

NOTAS. 1.<sup>a</sup> La cuota anual para la Sociedad Internacional es un spesmilo.—2.<sup>a</sup> Los socios reciban gratuita y quincenalmente la revista *Esperanto*, órgano de la Sociedad.—3.<sup>a</sup> Se les entregará, además, una lista con el nombre, apellido, profesión, domicilio, vecindad y nacionalidad de sus compañeros, con el fin de que pueda corresponder con ellos si es necesario.

## La ombro

(MIRRAKONTO DE ANDERSEN)

El «Dua libro de l' lingvo internacia.»

(*Daŭrigo.*)

«Mi pensas, ke mia ombro estas la sola viva estaĵo, kiun oni povas trovi tie kontraŭe!» diris la instruitulo. «Rigardu, kiel bele ĝi sidas tie inter la floroj, la pordo estas ne tute fermita, kaj nun la ombro devus esti tiel saĝa kaj eniri, kaj ĉion bone rigardi, kio estas interne, kaj poste, reveninte, rakonti al mi, kion ĝi tie vidis. Jes, jes, mia ombro, vi devus peni esti utila al mi!—diris li ŝerce. «Estu tiel bona kaj eniru! Nu, vi ne volas iri?» Kaj li balancis la kapon al la ombro, kaj la ombro rebalancis ĝian kapon.» Jes, jes, iru, sed baldaŭ revenu!» La alilandulo sin levis, kaj lia ombro sur la kontraŭa balkono sin ankaŭ levis; la alilandulo sin turnis, kaj la ombro sin ankaŭ levis; la alilandulo sin turnis, kaj la ombro sin ankaŭ turnis; se iu bone rigardus, li povus klare vidi, ke la ombro eniris en la ne tute fermitan pordon de la balkono de l'kontraŭa domo rekte en tiu momento, en tiu la alilandulo eniris en sian ĉambiron kaj mallevis post si la longan kurtenon.

Je l'postiranta mateno la instruitulo eliris, por trinki kafon kaj legi gazetojn. «Kio tio ĉi estas?» diris li, kiam li eliris en la lumon de l' suno, «mi ja ne havas ombron! Tiel ĝi hieraŭ je l'vespero efektive foriris kaj jam ne revenis; tio ĉi estas efektive ĉagrene!»

Ne tiel la perdo de l'ombro mem lin ĉagrenis, kiel tio, ke en la malvarmaj landoj estas rakontata unu ĉiukonata historio pri homo sen ombro. Se nun la instruitulo revenos en la patrujon kaj rakontos, kio okazis kun li, oni diros, ke tio ĉi estas nur ripetajo, kaj tio ĉi malplaĉis al li. Tial li decidis tute ne paroli pri tio, kaj tio ĉi estis tute prudente.

## La sombra

(CUENTO MARAVILLOSO DE ANDERSEN)

Del 2.<sup>o</sup> libro de la lengua internacional.

(*Continuación.*)

«¡Yo creo que mi sombra es el único ser viviente que pueda encontrarse ahí enfrente!»—dijo el erudito.—Mirad qué lindamente está ahí sentada entre las flores, la puerta está entreabierta, y ahora la sombra debía ser tan lista y entrar y mirar bien todo lo que hay interiormente, y después, de vuelta, contarme todo lo que allí viese. Sí, sí, sombra mía, tú deberías hacer por serme útil.»—Dijo él bromeando. «Sé tan buena y entra. ¡Ah!, ¿que no quieres ir?» Y hacía movimientos de cabeza á la sombra, y la sombra balanceaba su cabeza. «Sí, sí, ve; pero vuelve pronto.» El extranjero se levantó, y su sombra, en el balcón de enfrente, también se levantó. Volvióse el extranjero, y la sombra también dió la vuelta. Si alguno hubiese mirado bien, hubiese podido ver con claridad que la sombra entró directamente en la entreabierta hoja del balcón de la casa de enfrente, en el momento en que el extranjero entraba en su cuarto y dejaba caer tras sí la larga cortina.

A la mañana siguiente el erudito salió para tomar café y leer los periódicos. «¿Qué es esto—dijo cuando salió al sol—¡realmente yo no tengo sombra! De modo que ayer tarde, en efecto, se marchó y no ha vuelto ya; ¡esto, en verdad, es cosa triste!

La pérdida de la sombra, en sí mismo, no le apesadumbraba tanto como el que en los países fríos se refiriese una historia conocida de todos, de un hombre sin sombra. Si ahora el sabio volvía á su patria y contaba lo que con él había sucedido, se diría que esto no era más que una repetición, y esto le desagradaba. Por eso decidió no hablar sobre esto una palabra, y esto, en absoluto, era lo prudente.



malpuran Cindrinjon, laŭ oni povus diri... Dio helpu min! Se estus vivantaj miaj tri edzoj... Nur kun la lasta, se li estus vivanta, ĉar li havis humoron de serpento...

D. DIE.—Aŭskultu, sinjorino, mia pacienco preskaŭ finiĝis.

D.<sup>a</sup> IRE.—Tiel ke tuj kiam oni kontraŭdiris lin, li ekkoleriĝis same kiel furiozulo el Infero, kaj ian tagon de Corpus Christi, mi ne memoras pro kia bagatelo, li tiel batfrapegis ian registaran oficiston kaj se du monaĥoj Karmenaj ne estus malhelpintaj, li estus mortiginta la malfeliĉulon premiginte lin kontraŭ stango kiu staras en la pordego de Sankta Kruco.

D. DIE.—Sed, ĉu estas eble ke vi ne atentis kion mi volas diri?

D.<sup>a</sup> IRE.—Ha! ne, sinjoro, ĉar mi bone scias tion kion vi volas diri, kaj mi neniel estas naivega, ne, sinjoro... Vi ne amas plu la knabinon kaj serĉas ruzojn por eviti la devon kiun vi kontraktis... Filineto de mia animo kaj de mia koro!

D. DIE.—Sinjorino D.<sup>a</sup> Irene, havu la bonecon aŭskulti min, ne respondante, ne dirante maloportunaĵojn, kaj poste, kiam vi scios tion kio okazas, ploru, ĝemu, ekkriu, diru ĉion kion vi volos... Sed atendente, ne pligrandigu mian suferadon, pro amo al Dio!

D.<sup>a</sup> IRE.—Diru ĉion kion vi volas.

D. DIE.—Sed vi ne rekomencu ploradi kaj...

D.<sup>a</sup> IRE.—Ne, sinjoro; mi ne ploras plu. (*Ŝi viŝas siajn larmojn per naztuko.*)

D. DIE.—Bone, do; de ĉirkaŭ unu jaro, iom pli iom malpli, D.<sup>a</sup> Francinjo havas alian amanton. Ili ofte interparolis, skribis leterojn, promesis recipokan amon, fidelecon, konstantecon... Kaj fine, ekzistas ĉe ambaŭ pasio tiel firma, ke malhelpaĵoj kaj foresteco, anstataŭ malfortigi, eĉ kunhelpis ĝin pligrandigi... Sub tiaj kondiĉoj...

D.<sup>a</sup> IRE.—Sed ĉu vi ne komprenas, sinjoro, ke tio ĉio estas trompaĵo eltrovita de la skandalema lango kiu malamas min?

D. DIE.—Ni ree komencas kiel antaŭe. Ne, sinjorino, tio ne estas trompaĵo. Mi ripetas de nove ke mi tion scias.

D.<sup>a</sup> IRE.—Kiel vi povas tion scii, sinjoro, nek kian verŝaĵnon havas tio? Tiamaniere la filineto de mia koro, enŝlosigita en monaninejo, fastinte ĉian vendredon kaj cetere, akompanita de tiuj sanktaj virinoj! Ŝi, kiu eĉ ne scias kia estas la mondo, kiu ankoraŭ ne eliris el la ovŝelo, por tiel paroli! Kiel, videble, vi ne konas la karakteron de *Circuncision*... Kia virino por pardoni la plej malgrandan peketon!

D. DIE.—Ni ne pritraktas nun peketon ian, sinjorino D.<sup>a</sup> Irene; ni traktas pri honesta inklino, pri kiu ni ne havis antaŭan informon. Via filino estas knabino tre honesta, kaj ŝi ne estas kapabla fari malbonaĵon... Kion mi diras, tio estas ke patrino *Circuncision*, kaj *Soledad*, kaj *Candelaria*, kaj ĉiuj patrinoj, kaj vi, kaj mi precipe, ni ride-

ginde eraris. La knabino volas edziniĝu kun alia, kun mi ne... Ni alvenis malfrue; vi kalkulis tro rapide kun la konsenton de via filino... Sed, kial ni laciĝas? Legu tion ĉi paperon, kaj vi vidos ĉu mi estas prava. (*Li donas al ŝi la paperon de don Carlos. D.<sup>a</sup> Irene ne legas ĝin, sed leviĝas tre agitata, direktas sin al la pordo de sia ĉambro kaj trapas. D. Diego leviĝas kaj probas vane malhelpi ŝin.*)

D.<sup>a</sup> IRE.—Mi nepre freneziĝos!... Francinjo!... Virgulino de l' Tremedalol!... Rita!... Francisca!

D. DIE.—Sed kial vi alvokas ilin?

D.<sup>a</sup> IRE.—Jes, sinjoro; mi volas ke ŝi venu kaj sciu kia homo vi estas.

D. DIE.—Ŝi ĉion difektis... Tio okazas al kiu konfidas al prudento de virino.

## SCENO XII

D.<sup>a</sup> Francisca, Rita, D.<sup>a</sup> Irene, D. Diego.

RITA.—Sinjorino!

D.<sup>a</sup> FRAN.—Ĉu vi vokis min?

D.<sup>a</sup> IRE.—Jes, filino, jes; ĉar D. Diego agas kun ni laŭ modo kiu ne estas plu tolerebla. Kiajn amojn vi havas, infano? Al kiu vi promesis edziĝon? Kia konspiraĵo estas ĉi tiu? Kaj vi, granda friponino... vi ankaŭ devas scii... vi nepre scias... Kiu skribis tiun ĉi leteron? Kion ĝi diras? (*Prezentante la leteron malfermitan al D.<sup>a</sup> Francisca.*)

RITA.—(*Flanken, al D.<sup>a</sup> Francisca.*) Lia ĝi estas.

D.<sup>a</sup> FRAN.—Kia malboneco!... Sinjoro D. Diego, ĉu tiamaniere vi plenumas vian promeson?

D. DIE.—Dio bone scias ke mi ne estas kulpa... Venu tien ĉi... (*Ekkaptante manon de D.<sup>a</sup> Francisca li lokigas sin ĉe sia flanko.*) Nenion timu..., Kaj vi, sinjorino, aŭskultu kaj silentu, kaj ne devigu min fari sensencaĵon... Donu al mi tiun papeiron... (*Forprenante la paperon el la manoj de donja Irene.*) Francinjo, vi ja memoras la tri manplatbatojn de l' pasinta nokto.

D.<sup>a</sup> FRAN.—Dum mi vivos mi memoros.

D. DIE.—Bone, do, jen estas la papero kiun oni ĵetis tra la fenestro... Ne timu, mi jam diris... (*Li legas.*)

«Karulino: Se mi ne sukcesos paroli kun vi, mi  
 »faros ĉion eblan por ke vi ricevu tiun ĉi leteron.  
 »Tuj kiam mi disiĝis de vi, kaj renkontis en la  
 »gastejo tiun kiun mi nomis mia malamiko, ekvi-  
 »dinte lin mi ne scias kial mi ne mortis pro doloro.  
 »Li ordonis al mi ke mi tuj eliru el la urbo, kaj  
 »estis necese obei lin. Mia nomo estas D. Carlos,  
 »ne D. Felix. D. Diego estas mia onklo. Vivu ĉiam  
 »feliĉa, kaj forgesu por eterne vian malfeliĉan  
 »amikon, *Carlos de Urbina.*»

D.<sup>a</sup> IRE.—Nu, ĉu tio estas?

D.<sup>a</sup> FRAN.—Malfeliĉa mi!

D.<sup>a</sup> IRE.—Nu, ĉu tio estas vera kion diris la sinjoro, grandega friponino? Certege vi memoros min. (*Si direktas sin al donja Francisca, kolerigite*

*kaj volas ŝin frapadi. Rita kaj don Diego penadas malhelpi ŝin.)*

D.<sup>a</sup> FRAN.—Patrino!...

D.<sup>a</sup> IRE.—Ne, sinjoro, mi mortigos ŝin.

D. DIE.—Kia frenezo estas tiu?

D.<sup>a</sup> IRE.—Mi mortigos ŝin.

### SCENO XIII

**D. Carlos, D. Diego, D.<sup>a</sup> Irene, D.<sup>a</sup> Francisca,  
Rita.**

D. CAR.—Ne, ne. (*Eliras rapidege don Carlos el ĉambro, ekkaptas brakon de donja Francisca, kondukas ŝin al la fundo de l' teatro, kaj staras antaŭ ŝi por defendi ŝin. Donja Irene terurigas kaj deiras.*) Antaŭ mi neniu ofendos ŝin!

D.<sup>a</sup> FRAN.—Carlos!

D. CAR.—(*Alproksimiĝante al don Diego.*) Senkulpigu mian trokuraĝon... Mi vidis ke oni insultis ŝin, kaj mi ne povis subpremi min.

D.<sup>a</sup> IRE.—Kio estas tio kio okazas, Dio mia?... Kiu estas vi?... Kiaj agoj estas tiuj ĉi?... Kia skandalo!

D. DIE.—Tie ĉi ne estas skandaloj... Li estas tiu kun kiu estas enamiĝinta via filino... Ilin disigi kaj ilin mortigi estas tute same... Carlos... negrave... Prenu vian edzinon. (*D. Carlos iras kien estas donja Francisca, kaj ambaŭ genufleksas ĉe la piedoj de D. Diego.*)

D.<sup>a</sup> IRE.—Ha, ĉu via nevo?

D. DIE.—Jes, sinjorino, mia nevo kiu per siaj manplaŭdoj, kaj sia muziko, kaj sia papero pretigis por mi la nokton plej teruran kiun mi pasigis dum mia tuta vivo... Kio estas, gefiloj miaj, kio estas?

D.<sup>a</sup> FRAN.—Ĉu vi, do, pardonas nin kaj igas nin feliĉaj?

D. DIE.—Jes, gekaruloj de mia koro... Jes. (*Li devigas ilin leviĝi kun karesaj esprimoj.*)

D.<sup>a</sup> IRE.—Ĉu estas eble ke vi decidu fari oferon?...

D. DIE.—Mi estus povinta ilin disigi por ĉiam kaj ĝuadi trankvile posedon de tiu ĉi ĝentila infano, sed mia konscienco malpermesas... Carlos!... Francinjo!... Kia doloriga sento, lasas ĉe mia spirito la peno kiun mi ĵus faris! Ĉar, fine, mi estas homo mizera kaj malforta.

D. CAR. (*kisante liajn manojn*).—Se mia amo, se mia dankemeco snfiĉos konsoli vin pro tia perdo...

D.<sup>a</sup> IRE.—Tial ke ĉi tiu estas D. Carlos! Nu, nu, mi...

D. DIE.—Li kaj via filino frenezigiĝis pro amo, ĉar vi kaj la onkloroj konstruadis kastelojn en la aero, kaj plenigadis mian cerbon je iluzioj kiuj malaperis kiel songoj... Tiel rezultas trouzo de rato, de subpremado de juneco, tiaj estas la certigoj kiujn donas gepatroj kaj zorgantoj, kaj tia la konfido kiun oni povas havi je la jeso de knabinoj... Per ŝanco mi ekkonis la eraron en kiu mi

troviĝis... Ho, ve al tiuj kiuj ĝin ekkonas tro malfrue!

